

Aŭtoro de Esperanto
D-ro L. L. Zamenhof
(1859 – 1917)
*Gravuraĵo de Reto Rossetti*

Dumonata Bulteno
de la
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

# NORDA GAZETO

Informilo n-ro 6/274
(38-a jaro)
Novembro - Decembro 1978

## 15a MARKOLA KONGRESO — BULONJO
## FEDERACIA KONGRESO DE NFEF — 31-3 / 1-4-1979

Estimataj Gesamideanoj,

La Nordfranca Esperanto-Federacio elkore invitas vin honori per via ĉeesto ĝian jarkongreson, kiu okazos kadre de la Markola kongreso.

*PROGRAMO*

*Sabate, 31-an de Marto:*

- 9a : Malfermo de la akceptejo. La kasisto deĵoros por enspezi pagojn. Poste, oni povos butikumi, viziti la bazaron ĉe Placo Dalton, aliri al placo Zamenhof.
- 12a : Restoracio apud la urbodomo.
- 14a : Vizito tra la malnova urbo kun oficiala esperantista gvidisto. Projekciado de lumbildoj pri birdoj (R.LEFEBVRE)
- 19a : Restoracio.
- 20a30 : Oficiala akcepto kaj distra vespero : dancado, teatraĵetoj, ludoj en la salono de la urbodomo.

*Dimanĉe, 1-an de Aprilo :*

- *Matene* : Promenado en la haveno, ludoj en la urba banejo aŭ en la apuda parko – aŭ,
- 9a ĝis 11a : ĝenerala kunsido de NFEF.
- 11a: Ekumena diservo. Pastorino J. KOOPMANS (el Nederlando) predikos en Esperanto.
- 12a : Restoracio.
- *Posttagmeze:* Konsilia kunsido de NFEF *aŭ:* kantoj, vendado de libroj, ktp.

Nepre ĉeestu! Tiel, vi estos en amika kaj internacia etoso! La ludo ja kandelon valoras!

Anticipe ni dankas pro via multnombra partopreno.

La Federacia Estraro.

Redaktoro kaj
responda eldonanto:
Lucien BOURGOIS
25 rue Gambetta
62950 NOYELLES-GODAULT
(Tel. (21) 20.23.32)

Ricevas ĉiuj aktivaj UFE-membroj en la Federacia teritorio kaj la pagintoj de jenaj kotizoj :

- 20 F : Aktivaj Membroj
- 15 F : Membro-abonantoj
- 10 F : Junuloj au Pensiuloj

pagendaj al:
Fédération Espérantiste
du Nord de la France
25 rue Gambetta
62950 NOYELLES-GODAULT

per poŝta ĝiro LILLE 517-15 G aŭ banka ĉeko en *la nomo de la Federacio* sendota rekte al la kasisto :
Fernand DITACROUTE
Rond-Point Jean Jaurès
24430 RAZAC SUR L'ISLE.

Mondonacoj por la PROPAGANDO-FONDUSO estas dankeme akceptataj.

Provizora sekretario:
ROBERT LEFEBVRE
1 rue Cesar Willefert
62110 HENIN-BEAUMONT
Tel. (21) 20.27.75

DONAC-ABONO : Donacetoj subtenas amikecon! Komplezo naskas komplezon. Donace abonigu viajn geamikojn al *Norda Gazeto*! Ni dankas pro via helpo.

## *ESPERANTO - INSTRUADO*

*Douai* : Laŭ peto de la tiea Eŭropa Domo, Michel BOUCHEZ malfermis kurson. Partoprenis 6 personoj, kaj pluraj aliaj anoncis sian postan ĉeeston. M. BOUCHEZ ĉeestis, en Eŭropa Domo, dutagan seminarion pri instruado en Eŭropo. Interesa sperto! Partoprenis instruistoj el Francio, Germanio kaj Grekio. Bedaŭrinde (ĉu?)... – en ĉiu malbono estas iom da bono! – ili renkontis la lingvajn barojn. Sekve, M. BOUCHEZ sukcesis enirigi la problemon de Esperanto. Rezulte, unu lernejestro el Kolonjo kaj unu lernejinspektoro el Athinai petis pri la adreso de esperantistoj en sia resp. urbo; unu franca instruistino partoprenos la lokan E-kurson.

Tamen, ni nepre gardu nin mem kaj ne tuj venkokriu ... ni eksciis, ke la edzino de unu konsiliano atakis E-on post la foriro de nia amiko.

*Amiens:* Fraŭlino MAUCHIEN gvidas elementan E-kurson: 4 gelernantoj regule ĉeestas.

*Fouquières-les-Lens:* Funkcias du E-kursoj ĉe la gimnazio, kadre de la soci-kulturaj aktivaĵoj, nome : elementa, kun 10 gelernantoj, kiun gvidas Sigrid BOUCHEZ, sub kontrolo de instruistino: Suzette CARON, kaj daŭriga, kun 5 gelernantoj, instruas: Michel BOUCHEZ, gimnazia profesoro.

Krom tio, Esperanto servas kiel peranto por interlerneja korespondado kun la sveda urbo BENGTSFORS.

*Bulonjo-ĉe-Maro:* Funkcias du kursoj: elementa, kun 6 gelernantoj (instruas Daniel DOYE, instruisto), kaj daŭriga, kun 5 gelernantoj (instruas M. J. LINE).

*Hénin-Beaumont:* Kun permeso de sia lernejinspektoro, Robert LEFEBVRE malfermis E-kurson ĉe elementa lernejo Pallières, kadre de la oficiala 27-hora semajna programo. Ĉeestas 31 knaboj. Ni gratulas pro tiu neesperita sukceso!

Ankaŭ li zorgas pri la publika kurso, kiu malfermiĝis ĉe la Junulardomo, la 24-an de oktobro. Ĉeestas 9 gelernantoj, i.a. du instruistoj kaj unu profesoro pri germana lingvo.

Aperis artikoleto pri E° kun anonco pri la kurso en *N.M.* kaj *V. du N.* (marde, 10-an de oktobro).

*Noyelles-Godault:* Ekde oktobro funkcias du kursoj: elementa – ĉiumarde –, kun 7 geknaboj, kaj daŭriga – ĉiuvendrede–, kun tri gelernantoj, el kiuj du geinstruistoj.

En la loka rubriko aperis artikoloj en *V. du N.* (29/9) kaj *N.M.* (3-an kaj 4-an/10).

*Valenciennes:* Ree malfermiĝis la ĉiusabataj E-kursoj ĉe gimnazio Eisen, nome: elementa, la 14-an kaj daŭriga, la 21-an/10. La instruantoj estas resp. S-ino DURANDEAU (11 gelernantoj), kaj J. DIETRICH (5 progresantoj).

En 1979, la E-grupoj de Valenciennes kaj Duren festos la 20-an datrevenon de sia ĝemeliĝo.

*ADRESŜANĜO* M. PIERRU, antaŭe 29 rue Baillon, loĝas nun en 62100 CALAIS, 43 rue Félix Cadras. Renée TRIOLLE antaŭe en ROUBAIX, loĝas nun en 13600 LA CIOTAT, 'Bello Bauco', Chemin de la Civade Verde.

*NI DANKE KVITANCAS* la reabonon de: Familio FERMON, 49 rue de Cronstadt, 62100 CALAIS.

*NI GRATULAS:* Pascale HAMON, Profesoro pri Matematiko ĉe Liceo Wallon kaj membro de la E-grupo de Valenciennes, altiĝis je la grado de Oficiro de la Edukada Ordeno.

*FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO*
Sukcesoj en la ekzamenoj

*ATESTO PRI LERNADO*
BODSON, Sophie (B), CARLIER Marie-Thérèse (B), COUSSEMACQ Paul, DECOBERT Hélène (TB), DUBOIS Claude (B), DUWAT Jean-Pierre (TB), LINÉ Marie-Jeanne (B), PERUS Martine (SB), TYTGAT Nathalie, TYTGAT Pascale, WILHELM François (SB).

*ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO*
DURANDEAU Jean-Pierre, DURANDEAU Lucienne, LINÉ Marie-Jeanne.

*Ni varme gratulas la laŭreatojn kaj deziras al ili pliajn sukcesojn.*

*Al siaj legantoj*

NORDA GAZETO

*deziras agrablajn jarfinajn festojn*

# DIVERSAĴOJ

*Mesaĝo de Johano-Paŭlo 2-a:* La IKUE-kongreso 1977, en Czestechova, okazis sub la alta protekto de la Krakovia ĉefepiskopo, K. WOJTYLA, kiu nun iĝis lia papa Moŝto Johan-Paŭlo 2-a.

Tiuokaze, li salutis la kongresanaron. La teksto de la mesaĝo substrekas la rolon, kiun la supernacia lingvo E° povus ludi en nia disbatita mondo.

"Unu kredo kaj unu amo, kaj unu supernacia lingvo, Esperanto, helpu al vi unuigi la disbatitan mondon . . ."

*Novaj paŝoj en Brajlo:* La progresiga lernolibro de W. AULD: *Paŝoj al plena posedo* estas nun brajligata.

*Novaj terminaroj:* Aŭtomobilista terminaro: Ĝi estos 300-paĝa kaj estas nun finpretiĝinta. Finpretiĝas Esperantoterminaroj pri pasivaj komponantoj por elektroniko, hidraŭlikaj mekanismoj, aeronaŭtiko kaj botaniko.

*Vortaroj : Aperis:* la unua Esperanta-Makedona kaj Makedona-Esperanta vortaro kun konciza gramatiko. Ĉiu parto havas pli ol 10.000 vortojn; ankaŭ aperis –

- vortaro Portugala-Esperanta kaj Esperanta-Portugala;
- lernolibro kun vortaro Esperanta-bretona kaj bretona-Esperanta (eldonas: Omnivox, Parizo).

---

*Notu tion sur vian agendon!*

ĈEFAJ ESPERANTO-RENKONTIĜOJ 1979

(*Heroldo* dediĉos specialan numeron pri ĉiuj Esperanto-manifestadoj.)

31 Marto / 1 Aprilo : 15-a Markola Kongreso kaj Jarkongreso de la Nordfranca Esperanto-Federacio en Bulonjo-ĉe-Maro

27 Aprilo / 1 Majo : 71-a Nacia Kongreso de UFE en LILLE

29 Aprilo / 1 Majo : Kongreso de Franca Katolika Esperanto-Asocio en Lille

Paske : Kongreso de SAT-Amikaro en Avignon

13-20 Julio : Internacia SAT-kongreso en Swanwick (Derbyshire), Anglio

20-27 Julio : 35-a Internacia Junulara Esperanto-kongreso en Austerlitz

28 Julio / 4 Aŭgusto : 64-a Universala Kongreso de UEA en Lucerne (Svislando)

7 - 14 Aŭgusto : IKUE-kongreso en Luksemburgo (Luksemburgio)

*Turismaj prospektoj – Perlo de Frislando! Drachten.* Kvarpaĝa flugfolio en la internacia lingvo estas senpage ricevebla de : VVV Drachten E.O., Komunuma informcentro, Moleneid ZZ, NL 9203 ZW.

6 – *Gray-sur-Saône* : Ĝi estas la urbo de la E-muzeo. Ricevebla kontraŭ 2 rk. de : Turisma oficejo, 8 strato V. Hugo, 70100 Gray-sur Saône.

*RADIO – Urĝa alvoko* : Radio Vatikana ne ricevas sufiĉe da leteroj el Francio. Skribu! Petu en Esperanto la programojn de : Radio Vaticana, 00120 Città del Vaticano.

France-Inter – La 12-an de oktobro, ĉe 'Jeux des Mille Francs', pliafoje post demando pri Volapuko, Lucien JEUNESSE sciigis, ke ĝi estas internacia lingvo, kiel Esperanto.

La 15-an de oktobro, dum la programo 'L'Oreille en coin', oni amuze parolis pri la malfacilaĵoj de la belga ĉefministro TINDEMAN, kiu eksiĝis pro lingvaj problemoj. Je la fino oni kantis novan kanzonon, kiu konkludis: 'La solution, c'est l'espéranto'.

GAZETOJ – Aperis la n-ro 0/78 de *Semajno*, internacia magazino. Ponumera prezo: 3 gmk, jarabono: 150 gmk. Mendebla ĉe Stefan MAUL, Singerstrasse I/III, D-8900 AUGSBURG, FR Germanio, poŝtkonto Ngb 650 9w-858. La enhavo estas interesa. Bedaŭrinde, ne malmultas la preseraroj.

*Femina :* Tiu svisa germanlingva revuo (n-ro 14, 12 Julio 1978) aperigis 4-paĝan ilustritan artikolon pri Esperanto sub titolo : 'ESPERANTO . . . vorwarts, marsch!'. ( –Antaŭen!) Sur unu foto ni rekonas amikinon, kiu iam vizitis la E-klubon de Roubaix: Margrit GULDIN.

*Mondcivitana broŝuro:* Esperanta broŝuro 'Kongresoj de la Popolos' estas havebla ĉe: 'Citoyens du Monde', 15 rue V. Duruy, F 75015 PARIS, kontraŭ 3FF, aŭ respondkuponoj.

---

*UNUA OFICIALA PERKORESPONDA ESPERANTO-KURSO EN KANADO*

La kurso estas preparita *oficiale* de la Ministerio de Edukado en la provinco de Brita Kolombio kaj mendebla por la tuta Kanado (feliĉaj kanadanoj!).

---

# ĈIAM LA SAMA KANZONO...

La 6-an de Junio 1978, Maurice JANETTI, socialista senatano de departemento Var, sendis skribitan demandon, registritan sub n-ro 26.594 al la Ministro pri Kulturo kaj Komunikado, demandante, kiajn iniciatojn ĉi tiu intencas alpreni por akceli la ĝeneralan disvastiĝon de Esperanto.

Jen la respondo de la ministro:

*"la lerneja medio ne taŭgas kiel kadro por akceli la disvastiĝon de Esperanto, en la popolamasojn, kion deziras la estimata parlamentano. Efektive, la artefariteco de tiu lingvo, samkiel la manko de kultura trezoro, kiuj ĝin karakterizas, ne ebligas antaŭvidi ĝian enkondukon en la lernejajn programojn"* (laŭ *M.I.E., oktobro 1978*) – tradukita el franca.

...Jen ĝuste la samaj gurditaj argumentoj, kiujn ankaŭ uzis lia antaŭulo HABY, por malakcepti la leĝproponon 1967, prezentitan de la socialista grupo kaj apogitan de parlamentanoj el diversaj politikaj horizontoj (sume pli ol 200).

Konklude: *por droniĝi sian hundon, oni nomas ĝin rabia!*

Ankaŭ la iamaj koloniistoj prezentis similajn argumentojn por malpermesi la instruadon de la aŭtoktonaj lingvoj en la afrikaj lernejoj!

La franca Ministro pri Edukado preferas daŭrigi babelismon ol demokratigi la lingvo-instruadon!

Feliĉe, ne ĉiuj intence ignoras la homojn, kiuj riĉigis la Esperantan literaturon (Zamenhof, Grabowski, Kabe, Baghy, Kalocsay, Dresen Dresen, Bernard, Auld, Boulton, ktp.)

Jen, iaekzemple, la opinio de ĉina lingvisto: Kiugi OVERDA, unu el la respondeculoj de la Pekina Lingva Komitato:

*"Nun ĝuste Esperanto povas ludi la rolon de internacia lingvo. Mi opinias, ke Esperanto havas jenajn superecojn:*

*1) La vortoj de Esperanto ne estas arbitre elpensitaj, sed science artefaritaj post asimilado de fajnaj elementoj de diversnaciaj lingvoj.*

*2) Esperanto estas regula tiel en pronuncado kiel en gramatiko. Ĝi estas pli facile lernebla ol iu ajn nacia lingvo por la vastaj amasoj.*

*3) Esperanto ĉiam riĉigas sin per novaj vortoj aperintaj en produktado, klasbatalado kaj scienca eksperimentado.*

*Surbaze de tio, mi firme kredas, ke Esperanto havos brilan estontecon."*

(laŭ *El Popola Ĉinio*, aŭgusto 78)

---

**KOTIZTABELO 1979**

| | |
|---|---|
| UFE-membreco kun | |
| *Revue Française* | 80 F |
| " " " (nova membro) | 40 F |
| Jarabono por *Revue Française* | 30 F |
| " " " " (speciala enhavo por junuloj) | 10 F |
| UEA kun revuo *Esperanto* k jarlibro | 110 F |
| IKUE kun *Esperanto Katolika* | 48 F |
| FKEA kun *Fr. Katolika Espantisto* | 12 F |
| Abono al *Heroldo* | 62 F |
| **Nordfranca Esperanto-Federacio:** | |
| Aktivaj Membroj | 20 F |
| Membro-abonantoj | 15 F |
| Junuloj aŭ pensiuloj | 10 F |


**Pensu pri beleco**

uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.




**Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.**


Ĉu vi pagis la federacian kotizon 1978?
Nee, bonvolu aldoni ĝin kune kun via kotizo 1979. Ni dankas pro via subteno.

*La Gérant resp. Lucien BOURGOIS, 25 rue Gambetta, 62950 NOYELLES-GODAULT*
*Presis en Anglujo FELLOWSHIP PRESS, Gloucester.*